

Christian Wilhelm Kindleben,

Ĝoju, ĝoju ni kolegoj

tradukita de Ludwig Lazarus Zamenhof

1. Ĝoju, ĝoju ni kolegoj,
dum ni junaj estas!
Post plezura estanteo,
post malĝoja maljuneco
sole tero restas.

2. Vivo estas tre mallonga,
kuras ne tenate.
Kaj subite morto venos,
kaj rapide ĉiun prenos,
ĉiun senkompate.

3. Kie niaj antaŭuloj
en la mondo sidas?
Iru al la superuloj,
serĉu ilin ĉe subuloj.
Kiu ilin vidas?

4. Vivu la akademio
kaj la profesoroj!
Vivu longe kaj en sano
ĉiu akademiano.
Vivu sen doloroj!

5. Vivu ĉiuj la knabinoj,
belaj kaj hontemaj!
Vivu ankaŭ la virinoj,
amikinoj kaj mastrinoj,
bonaj, laboremaj.

6. Vivu, floru nia regno
kaj regnestro nia!
Kaj amikoj mecenataj,
protektantoj estimataj
de l' akademio.

7. Mortu, mortu malgajeco,
mortu la doloroj!
Mortu ĉiu intriganto
kaj malamon konservanto
longe en la koroj!

...

Christian Wilhelm Kindleben,

Gaudeamus igitur

1. Gaudeamus igitur,
juvenes dum sumus;
post jucundam juventutem
post molestam senectutem
nos habebit humus.

2. Ubi sunt, qui ante nos
in mundo fuere?
Vadite ad superos,
transite ad inferos,
ubi jam fuere.

3. Vita nostra brevis est,
brevi finietur,
venit mors velociter,
rapit nos atrociter,
nemini parceretur.

4. Vivat academia,
vivant profesores,
vivat membrum quodlibet,
vivant membra quaelibet,
semper sint in flore!

5. Vivant omnes virgines
faciles, formosae,
vivant et mulieres,
tenerae, amabiles,
bonae, laboriosae!

6. Vivat et res publica
et qui illam regit,
vivat nostra civitas,
maecenatum caritas,
quae nos hic protegit.

7. Pereat tristitia,
pereant osores,
pereat diabolus,
quavis antiburschius,
atque irrisores.

...

*Traduko de la Latina poemo "Gaudeamus igitur" de CHRISTIAN WILHELM KINDLEBEN (*1748 – †1785) en Esperanton de LUDWIG LAZARUS ZAMENHOF (Ludoviko Lazaro Zamenhofo, *1859-12-15 – †1917-04-14).*

Arg-81-159 (2004-01-28 17:08:17)

La teksto de tiu ĉi traduko estas prenita el la kantlibro "Mia Kantaro I" de Josef Schiffer, Wilstorfstr. 58, D-78050 Villingen-Schwenningen (5a plibonigita eldono de Novembro 2001).

*Verkinto de tiu ĉi Latina poemo estas CHRISTIAN WILHELM KINDLEBEN (*1748 – †1785), publikigita 1768.*

Arg-81-158 (2004-01-28 17:05:20)

Christian Wilhelm Kindleben, Student der Theologie in Halle, hat auf Grund einer alten Vagantendichtung aus dem 13. Jahrhundert, die auf einen lateinischen Bußgesang aus dem Jahre 1267 zurückgeht, diese Fassung des Liedes geschaffen. (Siehe das Liederbuch "Gaudeamus igitur", Historische Studentenlieder, zusammengestellt von Günter Steiger und Hans-Joachim Ludwig, VEB Deutscher Verlag für Musik, Leipzig, 1989, ISBN 3-370-00018-0)